# HEJS JUNECO

HISPANA ESPERANTA JUNULARA SEKCIO
C/. ATOCHA 98 - 4.ª
TELF. 230 87 98
MADRID - 12
HISPANIO

N-RO 119
decembro 1983



Geredaktoroj: Francisko Ksavero Moleono
Georgo Kamaĉo

Kunlaborantoj: Granda Majstro, E-isto 2570-PLUS-2, M.A.Sancho, Ismael García Robledos, Ada Fighiera, Petro Hernández, Hidro Ĥero, Spital Meger, La Rebusisto, G. Kamaĉo, HEJS, HEF, Alberto Franco, HEJSĉjo, la teleparolisto k.a.

## Enhavo


Paĝo 1 ...................... Freneza kovrilo
" 2 ...................... Enhavo
" 3 ...................... Arĥiartikolo
" 4 ...................... Leteroj al la Dir.
" 6 ...................... Negreto
" 7 ...................... SEVILO
" 8 ...................... La eskapinto
" 10 ...................... Por komencantoj: Vovoda pŝentado
" 11 ...................... Pli bone... Rebuso
" 12 ...................... LA BANKO DE HEJS
" 14 ...................... HEJS-invito. Ekde 1984... NOVA HEJS-JUNECO!!
" 15 ...................... Aliĝilo por Sevilo
" 17 ...................... La duonesperan-
" 18 ...................... tistoj. Anoncoj
" 19 ...................... (informoj de HEJS)
" 20 ...................... Redakcia n-o-t-o
" 21 ...................... Stultaĵoj
" 22 ...................... Resumo de la kunveno de HEJS
" 23 ...................... IJK
" 24 ...................... Kontakto-TEJO-UEA-HEJS


**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem. La redaktistaro pretas lingve korekti ĉiujn kunlaboraĵojn prozajn, sed ne la versajn por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon.**

**GRANDA MAJSTRO**



**RIGARDAS VIN**

# ARĤIARTIKOLO

Karaj
gelegantoj:
dum 1984

Granda Majstro rigardos
vin. Do, ne krokodilu, ne kabe
etu, legu nur Hejs-Juneecon,
ĉeestu nur la renkontiĝon de
Hejs kaj ne obeu niajn ordo-
nojn nek sekvu niajn konsilojn.
Ĉis!

# LETEROJ AL LA DIR.:

Sinjoro Direktoro de la interesega organo de HEJS, tio estas, Hispana Esperantista Junulara Societo:
Kial vi ne faras frenezan numeron? Kial vi ne publikigas kuirreceptojn? Kial vi ne enmetas afiŝon por pingle fiksi ĝin sur la muron de nia ĉambro? Kial vi ne publikigas desegnojn pri Zamenhofo aŭ pri la Granda Frato, kiu rigardas nin? Kial vi ne desegnas pliajn krokodilojn? Kial vi ne publikigas artikolojn de Alberto Franko, el Sevilo?

Esperantisto 2570-PLUS-2

(Respondo de la Redakcio: ĉu vi ne legis la revuon? Do, eklegu, stultulo...!).

**Estimata direktoro:**

**En sia nova etapo HEJS havis la gravan defion lanĉi revuon, kies plaĉaj ecoj saturigu la legemon de niaj membroj. Unuamomente mi mem prenis tiun taskon kaj modeste mi devas diri, ke la rezulto ne estis malbona. Nun mi trovas, ke la anstataŭantoj daŭras en persista kvalitemo. Ili plibonigis ĉion faritan kaj igis HEJS-Junecon unu el la plej legindaj revuoj de Hispanio kaj de la internacia junulara movado.**

**Mi esperis la samon de iliaj valadolidaj anstataŭantoj. Bedaŭrinde, la neeblo kontakti ilin dum la pasintaj dek monatoj ne permesis la komparon. Kiu ajn redaktos venontece nian revuon, konservu ĝian jam tradician kvaliton.**

**Paralele al la pliboniĝo de HEJS-Juneco aperis en la esperantista panoramo de Hispanio aliaj junularaj revuoj, kiuj iom post iom fariĝas**

pli interesaj kaj meritas nian atenton: SEJO kaj LA KORDOVA ESPERANTISTO. Ili montras la progreson de la junulara movado en Andaluzio. La hispana revuo devas malfermi siajn paĝojn al ĉi tiuj novaj iniciatoj, kiuj espereble iam baldaŭ klimaksos je la fondiĝo de ia andaluza junulara Esperanto-organizo.

Mi instigas vin, kara direktoro, por ke nia bulteno iĝu spegulo de nia laborado por Esperanto. Estas grave videbligi nian penadon por la progresigo de la movado, niajn klopodojn -kelkfoje aĉe kontaŭatakatajn-, aŭdigi nian voĉon en la entuziasmdezerta hispana movado.

Aliflanke mi invitas vin igi ĝin ankaŭ esprimilo por tiuj, kiuj deziras klarigi sian nekonsenton aŭ proponi ŝanĝojn. Demokrata asocio ne estas tiu, kies statuto permesas elekti siajn gvidorganojn per balotado, sed tiu, kiu fakte permesas esprim-eblojn por la nekontentuloj.

Gratulon, do. Dankon pro la revuspaco, kiun mi prirabas, kaj kalkulu ĉiam je mia amikeco.

Miguel A. Sancho
Prezidanto de HEJS

Kara direktoro:

Mi skribas por atentigi pri malĝusta uzado ĉe almenaŭ tri verboj kutimaj inter hispanaj esperantistoj: la verboj fiki, amori kaj rendevui estas transtivaj, do la komplemento post ili devas stari en akuzativo, tute ne antaŭata de la prepozicio "kun", kion mi ofte vidis.

Ismael García Robledos, Toledo




Ada Fighiera-Sikorska, redaktorino de Heroldo de Esperanto, transdonis al ni la recepton de kuko, kiu certe plaĉos al vi ĉiuj. Tiu kuko nomiĝas

NEGRETO

<u>Ingredientoj</u>: 200 gramoj da sukero, 200 gramoj da faruno, 2 kuleroj da kakao, 250 gramoj da graso (butero, margarino k.s.), kvar ovoj. Laŭvole: migdaloj, ŝelo de oranĝo antaŭe fritita en sukero, sekigitaj vinberoj...

<u>Procedu jene</u>: en kaserolo fandi la grason, sukeron, kakaon kaj duonan glason da akvo. Kiam ĉio fariĝos unu sola maso, malvarmigi. El tiu maso forpreni duonglason, kiu poste servos por kovri la kukon. (ĉi tio tre gravas, ĉar, se oni ne forprenos, la kuko estos tro malseka!). →




Poste aldoni (alterne) unu ovoflavon, iom da faruno (sen buloj), unu ovoflavon, farunon, ktp., ĉiam bone kirlante per kulero. Bati la ovoblankojn ĝis "neĝo", delikate miksi kun la maso. Aldoni (laŭvole) la sekigitajn vinberojn, oranĝoŝelon kaj migdalojn (dispecigitajn). Ŝmiri per butero la tortujon, aldoni iom da skrapita seka pano, enmeti la mason en la tortujon kaj ĉi tiun en fornon antaŭe bone varmigitan. Baki (depende de la forno) de 30 ĝis 50 minutojn. Provi per ligna bastoneto: se la kuko interne estas seka (la bastoneto devas eliri tute pura), la kuko estas preta. Lasi ĝin kelkajn minutojn en estingita forno kun malfermita fornopordo. Kiam kuko komplete malvarmiĝos, elpreni el la tortujo, fari en ĝi truetojn per bastoneto kaj kovri per la restanta ĉokolada maso. Bonan apetiton!

(el la receptaro de Ada)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

ATENTU! LA VENONTA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

HAVOS LOKON EN



# LA ESKAPINTO

La pluvo falas en dikaj gutoj sur la koton. La fulmoj trakuras tra la obskura ĉielo. Eĉ lupohurlo ne aŭdiĝas. La nokto estas brua kaj samtempe silenta, kvazaŭ io estus okazonta.

For, for, for! Tiu ideo hantas la menson de Jano, kiu kuras tra la stepo, spiregadante. Li haltas momenton kaj aŭskultas.

-Boj, boj!

Raŭk! Ili ne ĉesigis la spuradon. Sed kiel, mil diabloj!? Pluvegas, kaj liajn piedspurojn verŝajne malaperigis la pluvo. Sed ne estas tempo pripensi. Li devas fuĝi, forkuri rapide. Kie estas la lumo? Li ĝin ne vidas. Li rememoris ankoraŭfoje sian konversacion kun Ĥetto, kompano en la karcero, el kiu li ĵus eskapis.



---

-Kiam vi eliros, Jano, vi devos serĉi lanterno-lumon. Mi disponigis, ke aŭtomobilo venu vin serĉi por vin forporti. Vi devos iri...

-Silentu! Venas provoso.

Paŝ, paŝ, paŝ.

-Daŭrigu, Ĥetto.

-Vi devos iri norden kelkcent metrojn, ĝis vi

atingos tiun lumon. Tie oni atendos vin.

-Bonege. Kiel vi povis arangi ĉion ĉi?

-Sufiĉas scii, ke mi havas bonajn kontaktojn.

-Kiel mi pogos pagi vin?

-Per mono.

---

Kaj la lumo ne aperas. La hundaj bojoj sonas ne diste post li, kaj fojfoje la policanaj voĉoj. La pluvo falas abunde, tiom, ke ĝi kvazaŭ eniras ĝis la ostoj. Leviĝas vento frida, glacia rigidiga. Sur la ĉielo desegniĝas lumstrioj, kiuj prilumas en momento dum momento la stepon, kvazaŭ helpe al la persekutantoj. La tuto aspektis samtempe kiel pandemonio kaj edeno.

Jeno kuras, kuras. Li ekdemandas sin, ĉu li ne songas, ĉu li ne havas denove tiun revon, ke li fuĝas el la karcero al la libero. Sed baldaŭ tiu dubo disfalas: la pluvo certigas lin, la koto, gluiĝinta al liaj ŝuoj, pezas kiel plumbo, kaj la tondregoj sufiĉus por rompi ies orelojn.

Sed, kio estas tio? Jes, jes, eraro ne eblas: lumo! Jen ĝi! Mi estas libera, li pensis, mi fine atingis la celon de mia vivo: reakiri la liberon. Li plukuras, kuregas nun, sen senti lacon, ĉar lacon sentas ne la lacaj, sed la desperintoj, kaj li ĉi-momente estas esperantego.

Li troviĝas je dek metroj, la pluvo kaj la feliĉo blindigas lin, iom pli, iom pli... jen! Li jam estas ĉe la lumo. Apogita sur muro, li fulmorapide pensis pri la pasintaj suferoj kaj pri la bela vivo, kiu lin atendas.

Muro?, li subite rimarkis.

-Levu la manojn, Skaŭso! Eĉ ne moviĝu!

Jano Skaŭso gapis al la provosoj ĉirkaŭantaj lin, prilumataj de potencaj lumjetiloj kaj de la

lanterno pendanta ĉe la pordo de la karcero. Nun aperis ankaŭ la policanoj kun la hundoj, kiuj persekutis lin.

Klariĝis al li la afero: li rondiris kaj revenis al la startpunkto.

Li pensis pri la futuro: li devos pasigi pliajn jarojn en la karcero pro la sensukcesa eskapo. Li ne povis elteni eĉ la nuran penson kaj sin ĵetis kontraŭ policanon, preta strangoli lin.

La mitraloj ekklakis, kaj li peze falis sur la koton. Lia sango miksiĝis kun la pluvo.

Petro Hernández, Malago

---

**Por Komencantoj**

VOJEVODA PSENTADO

La raŭpa volano vringas vrakon pelmelan, sed ne tohuvabohuas dirlididie, dum dumdumaĵo huŝas hupe, se dirko nur luve kohobas. La lonĝado poe faga kribas la firnilon je psile rikiŝa ĵigulo, tamen ĵosas la asizo sen goferi la berserkitan ĥateton. La lea lofo umjakas per blizardo kun la mahuto suzereni al luĝanta boaco; kaj ne pro te, sed braĥiure forcado ŝtokas, sipajas, kripizas kaj oksifas la ŝpaton! La glosinigo disdimos eĉ ĉe pagajula malpobo: la kŝatriado krinolinos soloece.

Hidro Ĥero

# PLI BONE...

Pli bone estas morti
sub hufoj de bovin'
ol perdo, kaj por ĉiam,
la guston por la vin'.

Pli bone estas tusi,
se gorĝon ĝenas juk',
ol fluti pro senzorgo
la tusojn... per la pug'.

Pli bone estas legi
rakonton por infan'
ol libron filozofan
falontan el la man'.

Pli bone estas kisi
la lipojn de knabin'
ol iri la militon
kun risko de la spin'.

Pli bone estas kanti
feliĉon de la am'
ol ĝin persone sperti
ĉe ŝvite grasa dam'.

Pli bone estas vivi
kun ŝarko en la mar'
ol aŭdi en la urbo
tedaĵojn de najbar'.

Pli bone estas manĝi
la torton en festen'
ol senti la stomakon
tordiĝi de malplen'.

Pli bone estas ĉesi
kaj ne kantadi plu
ol vidi la ĝendarmojn
minaci nin pro l' bru'.


Spital Meger

---

# REB USO:




Proverbo
(L' SOLV', EN L' VENONTA NUMER')


*LA BANKO
GK18111966PK198317Z
N
*SP
BJALIST
La 18an de n
ELPENSIS
Georgo Kamaĉo
DESE
BANKIERAS



DE HEJS ★
PAGOS
AL VI,
HEJSANO,
UL
SOJN
KO,
embro, 1966
L.L.
ZAMENHOF,
LA UNUA DE
ESPERANTUJO
K18111966PK1983172
HEJS

1959 25 1984
HEJS
JUBILEA TENDARO
KORDOVO-PASKE 1984

1959 25 1984
HEJS
JUBILEA TENDARO
KORDOVO-PASKE 1984

1959 25 1984
HEJS
JUBILEA TENDARO
KORDOVO-PASKE 1984

HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO (Junulara Sekcio de Hispana Esperanto-Federacio kaj Hispana Landa Sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) plezure invitas vin partopreni la omaĝan akton al nia fondinto, eksmembroj kaj eksestraranoj, kiun ĝi organizos okaze de sia 25-jara jubileo.

La akto okazos kadre de la 8a Tendaro de nia organizo, kiu havos lokon la venontan paskon en Kordovo. La estraro kaj la komitato de HEJS atendas entuziasme vian ĉeeston.

La Organiza Komisiono

Rimarko: eksaj membroj kaj eksestraranoj, kiuj ne povos ĉeesti, bonvolu sendi skriban saluton al nia sidejo.

---

Ekde 1984... NOVA HEJS-JUNECO!!

Eldonas ĝin HEJS 1-foje erae sur dek mil paĝoj. Ĝi preżentas artikolojn de generala interezo. Duono de la enhavo de ĉiu numero estas verkita en nekomprenebla lingvaĉo (vidu ekzemplon pri tio sur la paĝo 10) por malebligi novajn esperantistojn eniri la HEJS-an medion.

## 44ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Sevilla, 7 - 12 Julio 1984

# ALIĜILO

Familia Nomo.............................................................................

Antaŭnomo S-ro/S-rino/F-ino (1).................................................

Aĝo (2)........................ Profesio (2)..............................................

Adreso......................................................................................

Urbo..................................................... Provinco (3)......................

aliĝas al la 44-a Hispana Kongreso de Esperanto kaj sendas per poŝtmandato, ĉeko, banko (1) la jenan sumon:

Kiel kongreskotiko en kat........ ........................ptoj

Kiel kongresdonaco ........................ptoj

Entute ........................ptoj

Nomoj de familianoj samtempe aliĝantaj

Familia Nomo.............................................. Antaŭnomo.........................

Familia Nomo.............................................. Antaŭnomo.........................

Familia Nomo.............................................. Antaŭnomo.........................

Plenigu por ili apartan aliĝilon.

(1) Forkstreku la nevalidan.

(2) Nur por statistiko.

(3) Eksterlandanoj menciu la landon.

Por uzo de la administracio.

| Pago ricevita | Konfirmilo sendita | Loĝejo mendita |
|---|---|---|
| | | |

# KONGRESKOTIZOJ

| | | 31/12/83 | 31/3/84 | 30/6/84 |
|---|---|---|---|---|
| 1 | Kongresano | 1.500 | 1.700 | 2.000 |
| 2 | Kongresano (Membro de H.E.F.). | 1.000 | 1.200 | 1.500 |
| 3 | Edzino de Kongresano | 900 | 1.000 | 1.200 |
| 4 | Id. id. en Kat. 2 | 700 | 800 | 1.000 |
| 5 | Junulo Membro de H.E.F. | 600 | 700 | 800 |
| 6 | Junulo ne membro de H.E.F. | 800 | 900 | 1.000 |
| 7 | Eksterlandano | 700 | 800 | 1.000 |
| 8 | Infanoj | 500 | 500 | 500 |

Membro de H.E.F. N.º........................

Loĝejoj: Ni informos per BOLETIN.

**Rimarkoj:**

1. Plenigu la aliĝilon kaj sendu ĝin al la Sekretariejo de la Loka Kongresa Komitato.
2. Sendu la koncernan kotizon al la 44a Hispana Kongreso de Esperanto, konto n.º 263240, Monte de Piedad y Caja de Ahorros de Sevilla, Urbana 6, Ronda de Capuchinos, 3-A, Sevilla-9.
3. La kotizo ne estas repagebla se la kongresano ne partoprenas en la Kongreso.
4. La aliĝilo estos traktita nur post ricevo de la koncerna pago.
5. Kongresanoj en kat. 1 ricevos dum la tuta jaro, la revuon «BOLETIN» senpage.
6. Kongresanoj en kategorioj 2 kaj 6 devas sendi atestilon de H.E.F. pri la pago de la kotizo de 1.984-a.
7. Se vi bezonas pliajn aliĝilojn petu rekte al la Sekretariejo de L.K.K., strato Sol, 75, Sevilla-3.

# LA DUONESPERAN-

Dum la lastaj esperantistaj okazintaĵoj, mi, kuriozinde, povis konstati la ekziston de personoj, kiuj multe laboras "per" Esperanto, kaj absolute ne volas labori "por" Esperanto. Tio estas, ekzistas kelkaj uloj, kiuj ŝatas nur la lingvan aspekton de Esperanto. Tiaj uloj ne komprenas, ke Esperanto havas du esencajn aspektojn: la lingvan aspekton kaj alian aspekton, kiu subtenas la unuan. Ĉi tiu lasta estas "la movado", sen kies helpo ne ekzistus Esperanto en sia lingva aspekto. Tiuj uloj kutimas sin nomi "purigistoj", sed mi preferas la nomon "duonesperantistoj", ĉar, forgesinte labori "por" Esperanto, ili laboras nur "per" Esperanto. La ĉiama priokupo de ĉi tiuj duonesperantistoj estas, ĉu nia lingva nivelo estas bona aŭ ne, ĉu en Hispanio oni parolas bone aŭ malbone, ktp. Ili konstante kritikas personojn, kiuj, pro multjara aĝo aŭ aliaj kialoj, faras erarojn en la parola aŭ skriba lingvo, sed ili ne rimarkas, ke ĉi personoj estas kiuj plej trafe, mirinde kaj respondece laboras "por" Esperanto, sen alia celo, ol la deziro atingi, ke en venontaj jaroj oni povu paroli pri "la lingvo" Esperanto.




Eble, en proksima estonteco, kiam Esperanto estos la oficiala lingvo por la interpopola komunikado en la mondo, ni ne bezonos "la movadon", kies funkcio estas vivigi kaj malestingi Esperanton. Tiam Esperanto estos iom malsama ol la nuna Esperanto. Nun estas tre malfacile pensi pri Es-

TISTOJ

peranto sen "la movado"; do, la kompletaj esperantistoj dediĉu sian laboron tiom al la lingvo, kiom al la movada aspekto.

Alberto Franco, Sevilo.

---

Ndlr: "... kaj Hodler mokis pri la kategorio de aprobantoj, kiuj ne sciis la lingvon, kaj pri la uzo de nacia lingvo en grupkunvenoj."

(El "Esperanto en perspektivo").

## ANONCO

Ciuj HEJS-membroj, kiuj ankoraŭ ne havas la membrokarton de nia societo, rajtas peti ĝin senpage de la Ĝenerala Sekretariejo de HEJS:

José María Rodríguez Hernández
Fernando de Córdoba 1, 3ª
CORDOBA-8



## ANONCO

Ni rememorigas al niaj membroj protektantoj, ke la kotizon por 1984 ili devas pagi. Se protektantoj ne pagas, kiel ni daŭrigos nian agadon?

500 p-toj pagendaj al nia konto: HEJS, Caja de Ahorros y Monte de Piedad, Atocha 62, Madrid-12, kontonumero 10566000342691. Bonvolu ne forgesi anonci poŝte vian pagon al Hispana Esperantista Junulara Societo, Atocha 98, MADRID-12.

# (informoj de Hejs)

-Kiel vi jam legis aliloke en ĉi revuo, la redaktadon de HEJS-Juneco transprenis en la tendaro de Gandio José Antonio del Barrio. De tiam, la estraro de HEJS perdis ĉian kontakton kun li. Li respondis neniun el niaj leteroj kaj klarigopetoj. Car ni ankoraŭ nenion scias, ni decidis denove eldoni la revuon en Madrido (li loĝas, supozeble, en Valadolido), almenaŭ ĝis la tendaro en Kordovo. Pro ke ni ricevis nenian revuan materialon el Valadolido, ni ne povis, kompreneble, publikigi la senditajn artikolojn. Ni pardonpetas al ties aŭtoroj, kiuj bonvolu kompreni, ke tute ne kulpas ni. Se vi pludeziras aperigi ĝin, resendu ilin al ni, ĉar ĉiuj niaj provoj reakiri ilin restis vanaj. Ni esperas, ke en Kordovo ni povos kontakti José Antonio del Barrio kaj klarigi la tutan aferon. Tio estas la kaŭzo de la okmonata malfruo. Intertempe, ni dankos ĉiun ajn, kiu donos al ni informon pri li.

-En la nacia kongreso de Esperanto en Zaragozo HEJS atingis la nekreskon de la kotizoj federaciaj por junuloj. Ĉi tiuj memoru, ke por 1984 ili devas pagi nur 750 pesetojn.

-Por la futuro, HEJS intencas eldoni adresaron pri sia membraro. Por tio ĝi antaŭe devas ricevi aktualan liston de la Federacio.

-Se vi estas nova juna membro (malpli ol 26-jara), kiu aliĝis al la Federacio, kaj ankoraŭ ne ricevis ion de HEJS, skribu rekte al ni sendante fotokopion de la konfirmilo.

-HEJS-paĝo en "BOLETIN" stagnas. Ĉu alia HEJS-Juneco? Ankaŭ pri Jordi Ferré, la redaktoro (?), ni scias nenion.

-Hispana paĝo en "KONCIZE" ne aperis -tial ni ne sendis tuj al vi. La redaktoro ĵuras je Zamenhof, ke li ne kulpas. Ĉu kredi liajn vortojn? Nur iu povas decidi: Super-HEJS!

-Kiel anoncite, okazis en Madrido la novembra kunsido de HEJS, pri kiu vi sekve povos legi.

-En la tendaro de Kordovo la individuaj membroj de HEJS elektos la komitatanojn B de la organizo (nuntempe ekzistas kvin komitatanoj C), tiel ke la komitato povos tiam eklabori.

-Ĉi-sube ni publikigas la liston de estraranoj, elektitaj en Gandio, de HEJS:

Miguel A. Sancho Pardo, Prezidanto
Carles N. Moya, Vicprezidanto kaj TEJO-komitatano
José Antonio del Barrio, Viceprezidanto
José María Rodríguez, Generala Sekretario
Jorge Bueno, Kasisto (elektita en Madrido)

---

## REDAKCIA -n-o-t-o-:

Ni komprenebIe dankas la membrojn de HEJS, kiuj dum ĉi tiu tempo sendis nul plendon. Tio signifas, aŭ ke ili estas tre komprenemaj, aŭ ke ili absolute ne interesiĝas pri HEJS nek pri la revuo.

STULTAĴOJSTULTAĴOJSTULTAĴOJSTULTAĴOJSTULTAĴOJSTULTA

La plej bona amiko de Esperanto estas Tàrzano, ĉar li ĉiam luktas kontraŭ la krokodiloj.


Pruviĝas, ke estas falsa la onidiro, ke la 1983-an Nobel-premion gajnis ne William Golding, sed Bernard Golden.

Necesas membro de HEJS por instrui Esperanton al la ĝibraltaraj simioj: se vila, pli bone.

Vi scias, ke la Esperanto-movado estas maŝino preskaŭ perfekta, ĉar kelkfoje okazas, ke unu el la kamoj difektiĝas. Ĉu vi povas divení, kiu estas la malbenita kamaĉo, kiu misfunkciigas la tutan maŝinon?

Denove oni teleelsendas la usonan serion M.A.S.H., omaĝe al nia kara prezidanto Miguel Angel Sancho.

La solvoj de la rebusoj aperos en la venonta numero.




Rebuso (nur vortradik'): Hispana urbo



RESUMO DE LA KUNVENO DE HEJS
Madrido, novembron 1983

-Junularaj aranĝoj en la nacia kongreso: la grupo de Malago eble ludos teatraĵon; oni proponis uzi forlasitan parkon por diversaj aktivaĵoj; oni pretigos komunan bankedon, kiu kostos ne pli ol 1000 pesetojn; estos pliaj aktivaĵoj.
-Hispana partopreno en la IJK de Swanwick: oni studas ankoraŭ la elspezojn; ĝis nun aliĝis nur unu HEJS-ano.
-Monrimedoj: oni oftigos la petojn ĉe la Ministerio pri kulturo; HEJS havas nuntempe 37000 pesetojn; oni daŭrigos la loteribiletvendadon, ĉar per ĝi ni atingos ĉi-jare almenaŭ naŭ mil pesetojn; nova kasisto, Jorge Bueno; oni proponos kampanjon rilate la aligon de novaj membroj (tre eble la venontan jaron venos dek kvin novaj aliĝoj el Malago kaj aliaj el Kordovo); laŭ la monrimedoj, oni faros allogajn broŝurojn.
-HEF: raporto de la prezidanto pri la lasta kunveno kun la estraro de HEF: bona situacio; rilate la aĝolimon de la membroj, ĉio restas, kiel oni akceptis en la kunveno de la kongreso de Madrido (oficialajn decidojn oni prenos en la tendaro).
-Eldono de adresaro.
-Kontakto kun junuloj membroj de ILEI.
-Starigo de la komitato.
-HEJS-Juneco (legu pri ĝi en "Informoj de HEJS").
-Tendaro en Kordovo: ĝi okazu en la urbodoma kampadejo; kotizoj: membroj de HEJS 150, nemembroj 250, kaj cent kromaj por la festo (por ĉiuj); ĉio grava okazu precipe la 22an kaj 23an de aprilo; oni festos la jubileon kaj omaĝos la eksmembrojn.

HEJS KONSILAS AL ĈIUJ GEJUNULOJ ALIĜI AL LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO KAJ ĈEESTI ĜIN.

# IJK 1984

## Swanwick, Britio

## 13–20 julio 1984




EKPLANU VIAN PARTOPRENON

Informoj: 40-a IJK, Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave, London, Britio W11 4UF, Tel. Britio 01-727 7821

# kontakto

HEJS KONSILAS AL ĈIUJ GEJUNULOJ ALIĜI AL UEA KAJ, SEKVE, AL TEJO.

Eldonas ĝin UEA kaj TEJO 6-foje jare sur 16 paĝoj. Ĝi prezentas artikolojn de ĝenerala intereso pri aktualaj temoj. Duono de la enhavo de ĉiu numero estas verkita en nekomplika lingvajo por kuraĝigi novajn esperantistojn eniri pli rapide la internacian medion.

Universala Esperanto-Asocio
Nw Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

**Pagu al la landa kotizperanto**

**Hispana:** Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2° izda., Santander. (pĉk. 03548531).

En la jarkolekto 1983 aperis 75 artikoloj el dek naŭ landoj. Laŭvice: Nederlando, Italio (11), Belgio, Britio (7), Svisio (6), Brazilo, Cinio, Svedio, FR Germanio (4), Japanio, Hispanio (3), Hinda Unio, Germana DR, Hungario, Pollando (2), Danio, Argentino, Irano kaj Kanado (1).

| | Membrokotizoj | | Abonkotizoj | | Aldonaĵo |
|---|---|---|---|---|---|
| | MJ(-K) | MA(-K) | SA | Kto | SZ |
| Hispanio/peseto | 960 | 2400 | 1440 | 720 | 4800 |

## KATEGORIOJ

**MJ(-K):** Individua Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 25 jaroj, *Kontakto*)
**MA(-K):** Individua Membro-Abonanto (kiel MJ(-K), plus revuo *Esperanto*)
**SA:** Simpla Abono de la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA
**Kto:** Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en TEJO
**SZ:** Kotizo por Societo Zamenhof (ne inkluzivas membrecon en UEA)
**PT:** Patrono de TEJO pagas duoble la kotizon de *Kontakto*
**DM:** Dumviva membro de UEA pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo MA. Oni ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj, dum oni ankoraŭ estas malpli ol 26-jara, *Kontakto*
**Pat:** Patrono de UEA pagas ĉiujare 10-oblon de la kotizo MA kaj estas aŭtomate membro de Societo Zamenhof.
**DPat:** Dumviva patrono de UEA pagas por la tuta vivo en unu fojo 250-oblon de la kotizo MA. Oni ricevas la samajn eldonaĵojn kiel DM kaj estas aŭtomate membro de Societo Zamenhof.
**DPT:** Dumviva patrono de TEJO pagas por la tuta vivo 50-oblon de la abonkotizo de "*Kontakto*". Oni ricevas la samajn eldonaĵojn kiel PT.

## Kion ricevas kiu?

| Kategorio | Jarlibro | Librokatalogo | Jarraporto | *Esperanto* | *Kontakto* | *Tejo-tutmonde* | Aĝlimo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **MJ** | jes | jes | jes | ne | ne | ne | — |
| **MA** | jes | jes | jes | jes | ne | ne | — |
| **SA** | ne | ne | jes | jes | ne | ne | — |
| **Kto** | ne | ne | ne | ne | jes | ne | — |
| **PT** | ne | ne | ne | ne | jes | jes | — |
| **DM** | jes | jes | jes | jes | ne | ne | — |
| **MJ-K** | jes | jes | jes | ne | jes | jes | malpli |
| **MA-K** | jes | jes | jes | jes | jes | jes | ol |
| **DM-K** | jes | jes | jes | jes | jes | jes | 26-jara |


★LA BANKO DE HEJS★
GK18111966PK198317Z
PAGOS AL VI, HEJSANO,
NUL
★SPESOJN
BJALISTOKO,
La 18an de novembro, 1966
ELPENSIS
Georgo Kamaĉo
DESEGNIS
BANKIERAS
L. L. ZAMENHOF LA UNUA DE ESPERANTUJO
GK18111966PK198317Z